

# la Riverego

ISSN 0830-9574

Bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia  
Septembro 1987. Numero 8-a. Jarkolekto 2-a.

8

## Ĉe humanista renkontiĝo

de Patriko Mongeau

La humanistaj asocioj de Kanado kaj Usono kongresis en Montrealo de la 26a ĝis la 28a de junio, en la hotelo *Du Parc*. Tiuokaze, Usonano Jim Deer, de longe Esperantisto, prelegis pri *Mondvido*, sabate matene.

Li invitis kelkajn Esperantistojn, ne nur por ĉeesti sian prelegon, sed ankaŭ por legi tekstojn kaj poemojn kadre de sia prelego. Ĉeestis la prelegon dekoj da kongresantoj.

Dum sia prelego, Jim klarigis tion, kio estas *Mondvido*. Li parolis pri la evoluo de la sunsistemo kaj de la tero, reprezentante ilin per kandelo kaj terglobo, kaj daŭrigis pri la evoluo de la vivo sur la tero, ĝin reprezentante per florbukedo. La celo de tiuj temoj estas la konsciigo de la graveco de la medio en kiu ni vivas, kaj kiun ni kune posedas. Poste, li legis kelkajn kontribuojn, kiujn li ricevis de aliaj grupoj, kiuj festas la *Mondvidon*. Fine, li prezentis Esperanton, kiel ilon por la interŝanĝoj inter tiuj grupoj.

Kelkaj ĉeestantoj starigis demandojn, ĉefe pri Esperanto. La etoso estis trankvila kaj la aŭskultantaron mi taksis komprenema. Journalistino de CBC intervjuis Jim kaj kelkajn Montrealajn Esperantistojn post la prelego.

### **Kio estas *Mondvido* ?**

*Mondvido* estas kutimo celebri la ŝanĝojn de sezonoj. Tio do okazas kvarfoje jare. La tialo por elekti tiujn festotagojn estas, ke ili estas neŭtralaj kaj gravaj tempoj en ĉies vivo.

*Mondvido* proponas, ke dum tiuj festoj oni pensu pri ĉiuj aliaj popoloj, kaj laŭeble kontaktu iujn kaj interŝanĝu leterojn, novaĵojn aŭ eĉ donacojn kun ili. Sed tial ke oni ne multe konas siajn korespondantojn, pri kio oni povas interŝanĝi? Kutime, kiam oni provas ekkonversacii kun nekonatulo, oni unue parolas pri la vetero: « Estas sufiĉe varme hodiaŭ, ĉu ne ? » Sed pro la distanco kaj tempo de alveno de letero, ne taŭgus paroli pri la vetero. Tial estas nature interŝanĝi pri la sezono, kiu estas iel resumo de la ĝenerala vetero dum pli longa tempo.

Jim Deer starigis grupon en Portland (Oregon), kiu festas tiujn tagojn kaj interŝanĝas materialon kun aliaj grupoj. Li starigis ankaŭ bultenon kies titolo estas *Mondvida bulteno*. MEK ricevis ekzempleron de tiu bulteno antaŭ kelkaj monatoj. □

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto.

*La Riverego* estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate.

ISSN 0830-9574. Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec.

Redaktoro: Sylvain Auclair.

Kontribuis Suzanne Bolduc kaj Patrice Mongeau

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Senpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 5 \$ por mara sendo: 6 \$ por aera sendo. UEA-kodo: kebk-d.

Unuopa numero: 0.50 \$ plus sendokostoj.

Adreso: Esperanto-Societo Kebekia  
C.P. 126, succ. Beaubien  
Montréal, Québec  
KANADO H2G 3C8 telefono : (514) 495-8442

## Aŭtuna renkontiĝo

Kiel oni anoncis al la ĉeestantoj de la Maskuta ĝenerala kunsido de E.S.K., okazos ĉi-aŭtune alian Kebekian renkontiĝon de la Eskanoj. Nu ĝi estos tute malsama ol la aliaj renkontiĝoj: tute neformala, sen ia ajn kunsido, sed por la plezuro renkontiĝi inter Esperantistoj. Tial la dutaga semajnfina renkontiĝo okazos ne en urbo, sed en natura medio. Ankaŭ la Amikoj de Esperanto estas invitataj renkonti la Esperantistan komunumon. Ĝi okazos dum la DankFesta semajnfino, t.e. la 10-a kaj la 11-a de oktobro 1987-a.

### Loko

Estis elektita iu feriejo en Contrecoeur, 75 km nord-oriente de Montrealo. Ĝi nomiĝas *Colonie de vacances Ste-Jeanne d'Arc*, kaj situas ĉe 10 020, Marie-Victorin, est, Contrecoeur, J0L 1C0, telefono 1.800.363.0098. Estos uzablaj por ni 15 du-litaj ĉambroj kaj 4 kvar-litaj ĉambroj. La ĉambrojn ni dividos surloke. Ni kompreneble povos uzi ankaŭ la apudan terenon kaj la halojn.

### Prezo

La prezoj estos la malplej altaj kiel troveble, cele ke ĉiuj Esperantistoj, eĉ malriĉaj, povos partopreni. Inkluzive de la kvar manĝoj ( kaj de la paŭz-manĝetoj ), kostos 30 \$ por plenkreskuloj ( 13-jaraĝaj kaj pli ) kaj 27 \$ por infanoj ( aĝo inter 3 kaj 12 jaroj, inkluzive ). Ĉar ne eblas ricevi vegetarajn manĝojn, eblas ankaŭ aliĝi sen manĝoj : tio kostas 24 \$.

Partoprenantoj devos kunporti siajn viŝ-tukojn, lit-tukojn ( aŭ dormsakojn ) ( tamen estos provizitaj la litkovriloj ) kaj sapon k.s.

### Programo

Sabate	11 h 30	renkontiĝo
	12 h	tagmanĝo
	13 h 30	konversacia rondo dunivela : Amikoj kaj komencantoj, kaj pli lertaj Esperantistoj
	16 h	paŭzo
	16 h 30	prelegoj ( prelegantoj kaj temoj proponotaj )
	19 h	vespermanĝo
	20 h	distra vespero ( eble ĉe fajro )

Dimanĉe	8 h 30	matenmanĝo
	9 h 30	promenado
	12 h	tagmanĝo
	13 h	sociaj ludoj ( en Esperanto )
	15 h	paŭzo kaj, poste, disiĝo.

La vetero eble iel influos la programon kaj estigos lastminutajn ŝanĝojn.

Por aliĝi, bonvolu plenigi la aliĝilon, kiu troviĝas sur alia paĝo. Sed vi devas **rapidi**. La aliĝilon kun la kompleta pago ( ĉeko al **Société québécoise d'espéranto** aŭ al **Esperanto-Societo Kebekia** ) ni devas ricevi ĝis la unua de oktobro. □

## Pri la nomo de kelkaj lokoj

Nuntempe estas plej vigle diskutata en la Esperantista medio la demando pri geografiaj nomoj. Ĉefe temas pri la sistemigo de la nomoj de landoj kaj de landanoj. Vi ekzemple jam povis legi en LA RIVEREGO pri la demando : ĉu *Kebeko* aŭ *Kebekio* kiel nomo de nia provinco. Kvankam Akademianoj kaj aliaj emus je la formo *Kebeka* kun la urbonomo *Kebekurbo*, la longtempa ĉi-tiea uzado de la alia formo ( kaj ĝia enskribo en la PLENAN ILUSTRITAN VORTARON ) igas nin daŭre uzi la formon *Kebekia*

### Maskuto

La ĉi-somera komuna kongreso de E.S.K. kaj K.E.A. okazis en urbo kun iom stranga nomo : Maskuto. Oni tiel Esperantigis la francan nomon : Saint-Hyacinthe. Tiu Esperanta vorto kaŭzis kelkajn problemojn : iuj kredis pri du malsamaj urboj ; pri ŝanĝo de la kongres-urbo ; pri la fakto, ke temas pri la urbo Mascouche...

La nomon *Maskuto* Manŭelo Kampanjaha unue proponis dum la unua renkontiĝo de E.S.K. ( ankoraŭ tiam fondota ), en Saint-Michel-des-Saints ( cetere kiel traduki tiun nomon ? ). Tiu vorto multe similas la francan adjektivan formon *maskoutain* kaj la nomo de la loĝanto tute normale estiĝas *Maskutano* simile al la franca. Tio estas pli facila ol ia *Sankt-Hiacintano* ĉu ne ?

Sed iuj demandas, kiel la neEsperantistoj povos rekoni tiujn formojn. Laŭ Manŭelo Kampanjaha, tio ne estas problemo: la Esperantajn formojn nur uzu Esperantistoj. Oni tamen povas demandi, kiel la Esperantistoj povos rekoni la nacilingvajn formojn...

### **Aliaj urboj\_**

La Esperantigo de la nomo de multaj urboj povas starigi disputon. *Montrealo* estas facila, sed *Vankuvero* kaŭzis problemojn. Ĉu ne pli indus *Vankuvrø* laŭ *Dovro* (france Douvres, angle Dover)? *Olavo* verŝajne konis tiajn problemojn. Nuntempe okazas diskutado pri *Hull* iuj proponus *Hullon*, *Hulon* aŭ *Holon*. Laŭ S-ro Kampanjaho, neniu el tiuj tri estas uzinda, ĉar neniu bone spegulas la anglan prononcon. Kaj li proponas la vorton: *Ascikvo*!

Li baziĝas ankaŭ sur historiaj asertoj. La nomo *Hull* havas neniun rilaton kun tiu loko. La urbo unue nomiĝis *Wrightville* (nun nomo de kvartalo) kaj ĝia nuna nomo laŭdire devenus de tiu de iu Angla urbo. Kontraŭe, la radiko *Ascikv* rilatas kun iu karakteriza reliefaĵo tiea, en iu Algonkena lingvo. Eĉ nuntempe la franca formo *Asticou* estas uzata por kelkaj komercaj nomoj, en *Hull*. Laŭ S-ro Kampanjaha, la vorto *Ascikvo* estas multe pli belsona ol la angla-devenaj nomoj.

### **\_regionoj\_**

Kebekio konsistas el multaj regionoj, ĉiuj kun apartaj nomoj. Kaj tiujn nomojn iam necesos Esperantigi. Kiam mi parolas Esperante, mi ofte stumblas ĉe tiuj nomoj. Ekzemple mi vizitis antaŭnelonge la regionon *Gaspésie*. Tiun nomon oni derivis de la urbonomo *Gaspé*. Kiel do diri *Gaspé* en Esperanto? Ĉu *Gaspo* (la akcento falas sur malĝusta silabo), ĉu *Gaspeo*? Ni tiam parolus pri *Gaspejo*, kiu al mi ne aspektas tre bela, pro la tri sinsekvaj vokaloj. Ĉu eble *Gaspejo* etimologie laŭ la Mikmaka (Indiana) nomo *Gespeg* de tiu loko? Tiam ni dirus *Gaspegio* por la regiono.

### **\_kaj provincoj**

Ankaŭ nomo de provincoj povas kaŭzi problemojn. Ĉi-tie videblas du skoloj pri la land-nomoj, t.e. la i-skolo kaj la sen-i-skolo. Anoj de la unua diros, ekzemple, Manitobio, dum anoj de la dua

diros Manitobo, k.t.p. La PLENA ILUSTRITA VORTARO listigas *Manitobon*, sed *Jukonion* laŭ ĝi, *Jukono* estas rivero...

La plej tikla demando rilatas al la plej orienta provinco de Kanada, kies franca nomo estas *Terre-Neuve*. Tial multaj franclingvanoj diras: *Novlando*. Tiu formo cetere aperis en la fama revuo *Monato*. Pro la angla nomo *Newfoundland*, la anglalingvanoj preferas la formojn *Novtrovitlando*, *Njufondlando* aŭ *Njufundlando*. Mi proponas la vorton *Teranova*, laŭ la Latina nomo *Terra Nova*. Manŭelo Kampanjaha, ĉiam kun originalaj ideoj, proponas la formon *Beotukio* aŭ *Beosukio*, laŭ la nomo de la Indianoj, kiuj loĝis tie.

S-ro Kampanjaha havas similan sintenon rilate al la provinco: *Princ-Edvarda Insulo*. Li ne ŝatas tiun nomon, ĉar ĝi estas longa kaj estas malfacile derivi de ĝi. Kaj li proponas la nomon: *Abegŭestio*, denove laŭ nomo de Indiana popolo.

Ĝis antaŭnelonge, la demando pri Teranova iel havis nur teoriantan aspekton, ĉar tie loĝis neniu Esperantisto, kaj tiu nomo tial estis malofte uzata. Sed nun ŝajne unua Esperantisto aperis tie, kaj estos interese ekscii, kiun vorton tiu preferos...□

## Kelkaj ciferoj

### Maskuto

Al la komuna kongreso de E.S.K. kaj K.E.A. venis ĉ. 40 homoj. Plej multaj ĉeestis dum nur unu aŭ du tagoj. Ili venis nur el Kebekio, ĉefe el Montrealo, kaj el Ontario, plej malproksime el Toronto. Pro la organizo de tiu aranĝo, E.S.K. profitis je ĉ. 100 \$.

Kelkaj monatoj antaŭ la okazo, kelkaj membroj de la organiza komitato estis proponintaj nuligon de la kongreso, pro antaŭvido de granda malprofito...

La ĝenerala kunsido de K.E.A. petis inviton de la Kalgariaj Esperantistoj por la venonta jaro. De tri jaroj la Kanadaj Kongresoj okazis en orienta parto de Kanado. Kvankam Manŭelo Kampanjaha jam kolektis 13 10-dolarajn aliĝojn, la Kalgarianoj rifuzis. Sed ili proponis... Montrealon. Se neniu alia volas inviti la Kanadan Kongreson, E.S.K. denove tion faros, sed en pli simpla formo. Estus posttagmezo por la statuta kunsido, kadre de pli leĝera aranĝo, kun ia distra vespero kaj samokaza (eble dum apuda tago) ĝenerala kunsido de E.S.K.

### **Financoj**

Dum la pasinta financa jaro ( ĝis la 31-a de majo ), la Societo profitis je 185 \$. La Societa kapitalo nun superas 1 900 \$. Sed tio ne enkalkulas la grandajn elspezojn, kiujn la Societo faras okaze de la Centjara Jubileo de Esperanto. Je la projekto de la aŭtobusaj afiŝoj, ni eĉ profitis : ni ricevis pli da donacoj ol ni bezonis. Tiuj troaj donacoj utilos por aliaj Jubileaj projektoj.

La Bildkarta Ekspozicio kostis ĉ. 500 \$, sed ni ricevis 100 \$ de K.E.A.

La pinglo-insignoj nur malrapide vendiĝas. Verŝajne restos iom granda stoko da ili. Ni daŭre bonvenigas ĉiujn mendojn, kaj ankaŭ ideojn por plibonigi la vendoritmon.

### **Membroj**

Nun estas ĉirkaŭe 45 ordinaraj membroj kaj samnombraj Amikoj de Esperanto. Do entute preskaŭ 100 membroj. Notu, ke en K.E.A. membras apenaŭ pli ol 200 homoj.□

## **Statuto**

Ĉiuj membroj antaŭnelonge ricevis referendumilon pri statut-amendoj. Tiujn statut-amendojn la ĉeestantoj de la ĝenerala kunsido en Maskuto jam estis pridiskutintaj kaj aprobintaj. La kontrolantoj de la baloto, Suzanne Bolduc kaj Patrice Mongeau, ricevis ĝis la oka de septembro (limdato por ricevo) entute 15 balotilojn. Kaj ĉiuj amend-proponoj estis forte akceptitaj. La statuto de E.S.K. sekve amendiĝis laŭ la proponita maniero. (Ekzemplero de la raporto de la kontrolantoj estas havebla ĉe la sidejo.)

Ni memorigas al ĉiuj membroj, ke ili povas ricevi ekzempleron de la statuto kontraŭ simpla peto (eĉ se sufiĉe granda kaj sufiĉe afrankita koverto estas ĉiam bonvena). Ili povas same ricevi ekzempleron de la protokoloj de la ĝeneralaj kaj estraraj kunsidoj.□

# MEKaj paĝoj

de Patriko Mongeau

Multaj personoj venis al la septembra renkontiĝo de la klubo. Ni iom bedaŭris la neĉeeston de Frank Labelle, kiu devis prelegi. Cetere venis Sylvano Bellise, kiu estis reveninta de vojaĝo en Eŭropo kun sia amikino Denise Richard. Ili ĉeestis kurson en tri gravaj Esperantaj lernejoj: Grezijono, Pisanica kaj La Chaux-de-Fonds. Ili tre ŝatis la esperantan etoson kaj multon rakontis al ni. Feliĉe por ili sed bedaŭrinde por ni, ili denove forflugis. Ĉi-foje por helpi en La Chaux-de-Fonds ĝis la printempo. Sana Metz rakontis siavice pri sia vizito al la festivalo « 100 jaroj de Esperanta kulturo » en Zagrebo.

Ni denove provizas la programon por la aŭtunaj renkontiĝoj. Ŝanĝoj kompreneble povas okazi. Mi aparte atentigas vin pri la unua horo de la renkontiĝo (je la 19a horo), dum kiu oni praktikas la lingvon. La formo de tiu parto estas tiam progresiga kurso, tiam konversacia rondo, tiam ludo.

Mi denove petas kontribuojn al iu ajn parto de la programo de tiuj vesperoj. Ju pli interesa kaj plena estas la programo, des pli ni amuziĝas kaj des pli da klubanoj venas.

## **aŭtuna programo**

5an de oktobro: konversacia rondo (Normand Fleury)  
prelego pri tapiŝfarado (Turan Sagafi)  
movada temo: Internacia komerca esperanta  
fakgrupo (Dragan Novakoviĉ)  
kantado (Sylvain Auclair)

2an de novembro: konversacia rondo (Patrice Mongeau)  
prezento de la filmo "Eta princo" (Marcel  
Desjardins)

7an de decembro: poezia vespero (kunportu poemon por legi;  
talentuloj verku!)



15an de decembro: Zamenhofa festo (komuna manĝo; ĉiu kunportu ion por manĝi)

Krom la monataj klubaj vesperoj, la klubo provis aranĝi alian renkontiĝon ĉi-somere: piknikon sur la insulo Notre-Dame. Estis belaj la vetero kaj la insulaj ĝardenoj. Tre agrabla promenado por la ĉeestintoj. Bedaŭrinde nur kvar klubanoj venis! Ĉu ni denove klopodu aranĝi ion similan?

### **Kvazaŭa kluba renkontiĝo**

de Silvano Auclair

Vendredon 11-an de septembro, multaj MEK-anoj kunvenis. Kial vendredon, kaj tuj post alia kunveno? Ĉar ĉeestis ankaŭ filmistoj de Radio-Canada.

Tiuj volis filmi la vivon de la Montrealaj Esperantistoj. Ili unue pasigis tri horojn, dum la posttagmezo, kun Normando Fleury, Zdravka Metz kaj iliaj infanoj: la nura Esperantista familio ĉi-tie.

Sed ili volis ĉeesti ankaŭ « kurson » kaj « kluban vesperon ». Ĉar al ili ne eblis veni dum vera kluba vespero, ni organizis kvazaŭajn kurson (kun kursanoj-roluloj) kaj vesperon. Verŝajne estis pli bone tiel, ĉar televido ne permesas la kutiman konduton.

Tamen estis agrabla renkontiĝo. Venis eĉ pli multaj homoj ol kutime. Johan-Paŭlo Collinge kantis kaj kantigis, kaj pluraj parolis pri siaj ĉi-someraj Eŭropaj spertoj. Samtempe okazis intervjuoj.

Tiu filmado okazis cele al 12-minuta raporto, prezentota kadre de *Au jour le jour*. Precizan daton ni ankoraŭ ne konas. □

## Ondoj

LA RIVEREGO estas verŝajne taŭga nomo por la bulteno de la Kebekia Esperantista komunumo, ĉar inter Esperantistoj estas ondoj same kiel en la riverego. Jen pruvo :

Dragan Novakoviĉ, membro de E.S.K., posedas entreprenon de importado kaj disvendado, kiu nomiĝas ONDO IMPORT & DISTRIBUTING INC.

Klaŭdo Lebuis, alia membro de E.S.K., antaŭnelonge fondis eldonejon, kun la celo eldoni Esperantajn kaj Esperantajn-francajn verkojn. Ĝi franclingve nomiĝas ÉDITIONS DE L'ONDE, kaj Esperante ELDONEJO ONDO.

Kaj tio estas koincido...□

## Estraro

Dum sia kunsido de la deka de aŭgusto, la estraro de la Esperanto-Societo Kebekia kompletigis kaj srukturigis. Tiuj, kiuj ĉeestis la Maskutan ĝeneralan kunsidon, scias, ke oni tiukaze elektis kvar estraranojn. Tiuj kvar alnomis Remigion Mielcarek kiel kvinan estraranon. Li jam estis estrarano de antaŭ kelkaj monatoj.

La nuna estraro estas sekve jena :

Prezidanto : Normand Fleury

Vic-prezidanto : Miroslav Ludva

Sekretario-kasisto : Sylvain Auclair

Konsilantoj : Victor C. Jaar kaj Remigiusz Mielcarek.□

## Varbado

En pasinta LA RIVEREGO, ni invitis vin partopreni grandan varb-kampanjon por la AMIKOJ DE ESPERANTO. Estos premio al tiu, kiu estos varbinta ĉi-jare plej multajn novajn Amikojn. Kvankam la nombro de la Amikoj de Esperanto daŭre kreskas, ni ricevis neniun indikon, ke ilin varbis jamaj membroj de E.S.K. Ŝajne tiu kampanjo iom lamas.

Por plivigliĝi ĝin, jen nova ideo. Ĝis novembro, interesatoj povos sendi la ĝisnunan du-dolaran kotizon al E.S.K. por iĝi Amiko por 1987. Ili tiel ricevos la **Jubilean pinglo-insignon** kaj la lastan numeron de NOUVELLES SUR L'ESPERANTO, en kiu estos aliĝilo por la venonta jaro. Tiam la Amikoj devos pagi 5-dolaran kotizon, kaj ricevos LA RIVEREGON, same kiel la aliaj membroj, dum la tuta jaro 1988-a. □

## Glumarkoj por vendi

Ni ricevis de Francio reklamon de belaj glumarkoj, kiuj multe similas poŝtmarkojn. Sur blua fono, videblas infanoj en rondo ĉirkaŭ terglobo, kaj legeblas la slogano: *Nous voulons apprendre l'Espéranto à l'école.*

Folio de 25 glumarkoj kostas po 2,50 francajn frankojn, plus la sendokostoj. Mendilon vi povas akiri ĉe la Landa Oficejo. □

# La Riverego

Esperanto-Societo Kebekia  
Septembro 1987-a. N-ro 8-a

Ĉi-numere:

Rapidu por la aŭtuna renkontiĝo  
Humanistoj en Montrealo  
Pri geografiaj nomoj  
Kaj aliaj informoj

Société québécoise d'espéranto  
C.P. 126, succ. Beaubien  
Montréal, Québec  
H2G 3C8